

UNIVERSITY LIBRARY

MAY 11 1918

PRINCETON, N.J.

Amerika Esperantisto

JANUARY, 1918



Official Organ of
The Esperanto Association of North America

AMERIKA ESPERANTISTO

Official Organ

of

THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA, Inc.

a propaganda organization for the furtherance of the study and use of the International Auxiliary Language, Esperanto.

CLUB DIRECTORY

This department is conducted solely for the benefit of our organized groups throughout the country. It furnishes a means of keeping in close touch with the work in other cities, for the exchange of ideas and helpful suggestions, and for the formation of valuable friendships in a united field of endeavor.

SAN FRANCISCO, CALIF.

San Francisco Rondo, meets Third Friday eve., Rm. 315 Lick Bldg., 35 Montgomery St. Fino M. D. Van Sloan, Sec'y, 946 Central Av.

BERKELEY, CALIF.

Berkeleya Esperanta Rondo.—Classes Monday and Tuesday evenings at 8.00.—Meetings Wednesday evenings. Address Vinton Smith, 530 62nd St., Oakland, Calif.

OAKLAND, CALIF.

Oakland Esperanta-Rondo; L. D. Stockton, Sec. & Tres., 436 15th St.

BOSTON, MASS.

Boston Esp. Soc., 402 Pierce Bldg., Copley Sq. Meets Tues., 8 P. M. R. Goodland, Sec.

WORCESTER, MASS.

Worcester County Esperanto Society.

Business Institute, every Friday, 8.00 P. M. BUTTE, MONT.

Argentarka Esp. Rondo, kunvenas vendrede, 8.00 P. M. C. L. Williams, Sek., 311 E. Mercury St.

CHICAGO, ILLS.

La Gradata Esperanto-Societo, Dvorak Park.

Jaroslav Sobchad, Sec'y, 1116 W. 19th Place.

La Esp. Oficejo, 1669 Blue Island Ave.

Kunvenas 2ma kaj 4an sab. ciumonante.

ROCKFORD, ILLS.

Skandinava Esperanto-Instituto, 417 7th St.

Joseph Johnson, Sec'y, 2315 Parmelee St.

CINCINNATI, OHIO.

Cincinnatti Esperanto-Soc., 629 Vine Street.

Miss Florence Becker, Sec., 332 Third Ave., Dayton, Ky.

DELPHOS, OHIO.

Delphos Esperanto Klubo, Carnegie Library; Meets every Tuesday, 7.30 P. M., A. J. Laudick, Sec'y.

CLEVELAND, OHIO.

La Zamenhofa Klubo; S. Kozminski, Sek., 3547 W. 44th St.

PORTLAND, ME.

Portland Esperanto Society, Trelawny Bldg., Mrs. Wm. C. Tapley, Sec'y, 13 East Promenade.

MILWAUKEE, WISC.

Hesperus Esperantists, Sino B. H. Kerner, Sek., 632 Summit Ave., 3rd Tuesdays, 8 P.M.

DETROIT, MICH.

Detroit Esperanto Office, 507 Breitmeyer Bldg., open daily. Library at disposal of everybody daily, 7 A.M.-9 P.M., except Tues. and Fri. Classes meet Tues. and Fri., 8.10 P. M.

Groups are listed for 12 issues of the magazine, at a cost of only 25 cents for the two-line insertion. Extra lines are 10 cents each additional. The heading—name of city or town—is inserted free. This matter warrants the immediate attention of every club secretary.

La Pola Esp. Unuiĝo, ĉiusemajne, Magnus Butzel Library, Harper & E. Grand Blvd. La Septembr, Tues., 8.00 P. M., 578 Alexander Ave., W.

HOUSTON, TEXAS.

Houston Esperanto Rondo, ĉiun mardon, 8.00 P. M., ĉe Y. M. C. A. S-ro A. F. Sundermeyer, Sek.

NEW YORK CITY, N. Y.

The Greater New York Esperanto Society, including all chartered clubs in Manhattan, The Bronx, Brooklyn, Queens, Richmond, Long Island, Westchester County and the New Jersey suburbs, C. C. Coigne, Secretary, 2633 Creston Avenue. Esperantists visiting New York should call Fordham 2749.

The New York Barco, or Esperanto supper, is held on The Third Friday of every month (7 P. M.), at the new headquarters of the Civic Club, 14 West 12th St. (two doors west of 5th Ave., south side); conveniently located to "L" and subway lines.

La dimanĉa kunveno, al kiu cii estas onvenaj, okazas je la tria horo, posttagmeze, ĉiun dimanĉon, ĉe la loĝeo de S-ro Joseph Silbernik, 229 East 18th St., Manhattan. Germana Esperanto-Societo — activities suspended during the war.

PHILADELPHIA, PA.

Phila Esp. Soc., J. F. Knowlan, Sec., 45 No. 13th St. Meets 4th Fri., Windsor Cafe, 1217 Filbert St.

Rondeto de Litovo-Polaj Esperantistoj, 2833 Livingston St.

PITTSBURGH, PA.

Esperanto Sec., Academy of Science and Art Wm. Smith, Sec., 7315 Greenwood St.

Fridays, 8 P.M., Teachers' Rm., Carnegie Inst.

PLAINVIEW, NEBR.

Esperanto-Fako de la "Sola Skolto" (Lone Scout), 500 N. Dearborn, Chicago, Ill. (Revuo por la Junularo. Organizo grupoj inter la geknaboj. Granda sukceso. Abonu tuj! Jare .75; Kvaramonate .25.)

Fakestro, Chas. P. Lang, Plainview, Nebr.

HOBOKEN, N. J.

"I.O.O.F. Esperanto Club No. 1 of Greater N.Y." meets every Tuesday at 8.30 P.M. in 61 First St., 3rd Floor West. All welcome. Pres., Mrs. M. O. Haughind; Sec'y, Wm. Preusse; Instructor, A. Mendelson. Address all communications to the secretary at above address.

Amerika Esperantisto

American Esperantist

Entered as second-class matter May 15, 1913, at the Postoffice at West Newton Station, Boston, Mass., under the Act of March 3, 1879.

Published Monthly by

THE AMERICAN ESPERANTIST COMPANY (Inc.)
WEST NEWTON, MASS.

One Dollar a Year.

Single Copy Ten Cents.

Mallongaj verkoj, tradukoj kaj novajoj ĉiam preferas akceptitaj.
Oni ne resendas neakceptitaj manuskriptojn, se la sendinto ne kune sendis la resendpagon. La Redakcio konservas por si la rajton korekti manuskriptojn laŭbezone.

Oni donos la preferon al manuskriptoj skribitaj skribmaſine.

VOL. 21

JANUARY, 1918

NO. 6

THE CONGRESS COMMITTEE

The Executive Committee have recently appointed the following as the "Komitato por la Dekunua":

Mr. Geo. Winthrop Lee (Chairman),
Boston, Mass.

Mr. Edward S. Payson, Boston, Mass.
Mr. Ernest F. Dow, West Newton,
Mass.

Mr. Alfred E. Lunt, Boston, Mass.
Miss E. J. Merriam, Boston, Mass.

Mr. Jas. F. Morton, Jr., New York
City.

Already this committee has gotten down to business and given evidence that they do not intend to let Green Acre take a "back seat" among the kongresoj of the E. A. N. A. They realize, however, that the success of the affair to a large extent depends upon the hearty cooperation of our whole membership and therefore urge all not merely to put the Congress dates (July 18-21) upon their summer programs but also to send in to the Committee thru the Central Office any helpful suggestions that may come to mind.

WHY YOU ARE COMING TO GREEN ACRE

In my former article, descriptive of the beautiful spot in which the Esperantists of America will convene next summer, I laid chief stress on the physical charms of the place and on its many opportunities for the enjoyment of natural beauty and of wholesome recreation. My words have not fallen on barren ground; inasmuch as I have already learned of a number who will take the advice given, and will come prepared to spend a week or two more than the Congress period, either in Green Acre or in some of the surrounding centres of attraction. Let me add one pressing word. Do not, under any circumstances fail to bring some old clothes with you, or at least, outing suits which will stand plenty of wear, if you wish to obtain the maximum enjoyment out of your opportunities. Leave your elaborate costumes at home, and come simply clad, to enjoy wholesome and unrestrained out-door life. This is especially imperative for those who intend to stay after the Congress.

But there are other considerations which will weigh heavily with those Esperantists to whom their cause

larger size. Whether we continue or not depends on your desires. Please—this means you—write and let us know whether or not you wish us to continue with this size or return to the smaller type.



HEROIC PIONEERING



"Young men," said a prominent Socialist addressing a meeting of Yale students, "if you would develop your manhood adopt an unpopular cause and work for it."

Whatever our political creed, we can appreciate the force and wisdom of this advice. The struggling minority is generally made of finer fibre than the indolent majority. The lonely frontiersman daily faces perils, any one of which would probably frighten the metropolitan citizen clean out of his boots. And yet the leatherstocking hasn't every advantage; his heroism can be matched by the urban in fields of pioneering which, if not so picturesque, at least require as much patience and perseverance.

"Unpopular" causes demand such qualities. Yet it is not necessary so to classify Esperanto. More properly it must be styled a **non-popular** cause, in the sense that the populace has not yet awakened to its possibilities. It is our mission therefore to arouse the people as the bugler sounds the reveille. The first impulse of the sleeper is to resent the disturbance, but he soon realizes the beneficence of the bugler. So Esperantists disturb some conventionalities, especially when they urge the adoption of the international language into our school curricula. But once awakened, the authorities will readily recognize Esperanto as a study unsurpassed for mental training, and superior to many branches in its world-wide usefulness. Be cheerfully unpopular, samideanoj, for a brief period of pioneering.



BUFFALO'S ESPERANTO SOCIETY



For the study of Esperanto a Buffalo Esperanto Society has been organized with E. A. Warren as president, and Miss Ray Morris as secretary. The society has been formed with the expectation that the language will be much used after the war. Other members will be welcomed. It is stated by the secretary that the only charge is for textbooks, stationery and other incidental expenses.

—Buffalo, N. Y. "Express."

**TENTATIVE PROGRAM OF THE ELEVENTH
ANNUAL CONGRESS OF THE
ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA**

—○—
GREEN ACRE, ELIOT, MAINE

JULY 18-21, 1918

—○—
Wednesday, July 17 (Informal)

P. M. Arrival of caravan from New York and greeting at United States Hotel, Beach Street, Boston.

Thursday, July 18

9.00 A. M. Train leaves North Station for Portsmouth (57 miles). Fare 3 cents a mile plus war tax. Additional fare to Green Acre by train and trolley, or by ferry and trolley, probably less than 20 cents.

2.00 P. M. First Session:

Address of Welcome, Alfred E. Lunt, Chairman of the Green Acre Trustees.

Reports from Councilors.

Komunikoj de Societoj kaj samideanoj kiuj deziras saluti, rekomendi, k.t.p.

"Esperanto in World at Large." Reports by G. W. Lee.

Report of Sec'y-Treas. Ernest F. Dow.

Address of President. Dr. H. W. Yemans.

"Esperanto and Girl Scouts. Mrs. Pearl J. Parker.

"The Relation between Green Acre and the Esperantists' Purpose. James F. Morton, Jr.

Announcements: The Esperanto Class; excursions and other features of program.

(After adjournment of session) Brief meeting of New England Esperanto Association and other sectional meetings, subject to postponement to meet convenience of delegates.

8.00 P. M. Legado, de S-ro Edward S. Payson.

9.00 P. M. Reception of Esperantists by representation of the Green Acre Trustees or Fellowship.

Friday, July 19

9.30 A. M. Unfinished Business.

Parolaĵoj de eminentuloj (kaj ĉiuj "dezirantuloj" se la tempo permesos).

"Esperanto in the Schools." Dr. D. O. S. Lowell. Discussion (opened by Herbert Harris).

2.30 P. M. Trip to Hampton Beach, by trolley or automobile or both, and clambake supper. Returning.

8.00 P. M. Teatrajetoj.

Saturday, July 20**9.30 A. M. Unfinished Business.**

Generala diskutado pri la propono ke oni invitu la 1920an Mondkongreson esti en Bostono.

Symposium: "Group, Class and Propaganda Methods" (see first two pages of British Esperantist for February, 1918).

2.30 P. M. According to individual preferences: York Harbor; York Beach; Ogunquit; Mt. Agamenticus; up York River in canoes or row boats. Excellent moonlight picnic possibilities. It is likely that two or more of these events can be combined. Autos will be wanted for Mt. Agamenticus, which is about four miles from nearest trolley line; and, weather permitting, some may prefer longer or shorter walks in connection with any of these outings. The entire afternoon and evening program is to afford good opportunities for getting to know one another and for exchange of ideas. It is for Bahaists as well as Esperantists.**Sunday, July 21****A. M. Diservo (anoncota). Rev. James L. Smiley.**

Other features such as may be decided upon during the preceding days.

Monday, July 22 or Tuesday, July 23, or both

Post conference, under the auspices of the Boston Esperanto Society. Possibilities of returning to Boston by trolley or by boat or by auto trip to Camp Devens, ending with reception at Society's room (the headquarters of the post conference), 402 Pierce Building, Copley Square.



**EL ĈERPAĴOJ EL LA PAROLO DE PREZIDANTO
WILSON AL LA USONA KONGRESO**

2an de Aprilo, 1917



Esperantigita de Benj. W. Reich



* * * Kun profunda sento pri la solena kaj eĉ tragedia karaktero de la ekipaĵo, kiun mi nun faras, kaj pri gravaj respondecoj, kiujn ĝi envolvas, sed kun nešanceliga obeemo al tio, kion mi konsideras kiel mian konstitucian devon, mi konsilas, ke la Kongreso deklaru, ke la lasttempa agmaniero de la Germana Imperia Registaro estas fakte nenio alia ol milito kontraŭ la registro kaj popolo de la Unuigitaj Statoj; ke la Kongreso plene akceptu la staton de militanto, kiu estas tiel altrudita al ĝi, tuj faru aranĝojn ne nur por meti la landon en pli perfektan staton de

defendo, sed ankaŭ por utiligi ĝian tutan forton kaj uzi ĉiujn siajn rimedojn por devigi la registaron de la Germana Imperio kapitulaci kaj fini la militon. * * *

* * * Nia nuna celo * * * estas defendi la principojn de paco kaj justeco en la vivo de la mondo kontraŭ egoista kaj aŭtokrata potenco kaj starigi inter la efektive liberaj kaj memregantaj popoloj de la mondo ian akordon pri celo kaj agadoj, kiu de nun garantias la ĉiaman observadon de tiuj principoj.

Neŭtraleco ne estas plu praktikebla nek dezirinda se la paco en la mondo kaj la libereco de la popoloj estas minacataj kaj se la minaco al tiu paco kaj libereco troviĝas en la ekzisto de aŭtokrataj registroj apogataj per organizita soldataro, kiu estas kontrolata nur de ilia volo, ne de la volo de ilia popolo. Ni estas spertintaj, ke en tiaj cirkonstancoj la neŭtraleco eksterminigas.

Ni staras ĉe la komenco de epoko, dum kiu oni insistos por ke la samaj principoj pri konduto kaj pri respondeco pro farita maljustajo estu observataj inter la nacioj kaj la registroj tute egale, kiel inter la individuaj regnanoj de civilizitaj regnoj.

* * * Firma interkonsento por paco neniam estas konservebla krom per societigo de demokrataj nacioj. Al neniu aŭtokrata registro oni povus fidi, ke ĝi konservos la fidelecon aŭ observos la interkonsentojn. Tiu societigo devas esti interligo de honoro, unuiĝo de opinioj. Intrigo forkonsumus ĝiajn esencajn; la konplotoj de iuj enestantaj grupoj, kiuj povas projekti, kion ili volas, ŝuldante prirespondon al neniu, estus putrado lokita en ĝia kerno mem. Nur liberaj popoloj povas firmi gardian intencon kaj sian honoron celante al komuna celo kaj preferi la utilojn de la homaro ol iun ajn nenoblan propran utilon. * *

* * * Unu el la aferoj, kiuj servis por konyinki nin, ke la Prusa aŭtokratio ne estis kaj neniam povos esti nia amiko, estas tio, ke tuj de la komenco de la nuna milito ĝi plenigis niajn konfidemajn komunumojn kaj eĉ niajn registrojn oficejojn je spionoj kaj komplotis cie krimajn intrigojn kontraŭ nia nacia unueco de celo, nia interna kaj ekstera paco, nia industrio kaj komerco.

Efektive estas nun evidente, ke ĝiaj spionoj troviĝis ĉi tie eĉ antaŭ kiam la milteto komenciĝis; kaj bedaŭrinde estas ne konjektaĵo sed fakteto pruvita en niaj jugistaj kortumo, ke la intrigoj, kiuj pli ol unu fojon apenaŭ ne rompis la pacon kaj apenaŭ ne difektigis la industriojn de la lando, estis kondukataj laŭ la instigo, per la subteno kaj eĉ per la propra direkto de oficialaj agentoj de la Imperia Registro alkreditigitaj al la Registro de la Unuigitaj Ŝtatoj.

Eĉ penante por bridi kaj ekstermi tiujn ĉi farojn, ni provis doni la plej eblan noblan interpretadon pri ili tial, ke ni sciis, ke ili devenas ne el iu malamika sento aŭ intenco de la Germana popolo kontraŭ ni, ĉar ĝi sendube tiom nescianta pri ili estis, kiom ni mem, sed el la egoismaj celoj de la Germana Registaro, kiu faris tion, kio plăcis al ĝi, sciigante sian popolon pri nenio. Sed tiuj faroj kunefikis por fine konvinki nin, ke tiu Registaro ne havas veran amikecon al ni kaj intencas agi kontraŭ nia kvieteco kaj sendangereco laŭ sia plaĉo. Ke ĝi intencas inciti malamikojn kontraŭ ni ĉe la sojlo mem de nia lando, la dumvoje kaptita noto al la Germana reprezentanto en Meksiko estas evi-denta pruvo.

Ni akceptas tiun ĉi malamike intencitan batalinviton, ĉar ni scias, ke tia registaro, uzanta tiajn metodojn, neniam povos amikiĝi kun ni, kaj ke dum la ekzisto de ĝia povo, ĉiam insidanta por plenumi iajn nesciatajn de ni projektojn, ne povas ekzisti garantiita sendangereco por la demokratiaj registaroj en la mondo.

Ni estas akceptontaj la batalinviton por batali kontraŭ tiu ĉi laŭnatura malamiko de libereco kaj ni uzos, se necese, la tutan forton de la nacio por bridi kaj nuligi ĝiajn pretendojn kaj gian povon. Ni estas kontentaj vidante nun la faktojn sen iu ĝirkaŭ-anta vualo de malvera preteksto, tiamaniere batalantaj por la fina tutmonda paco kaj por la liberigo de ĉiuj popoloj, enkalku-lante la Germanan popolon, por la rajtoj de la grandaj kaj mal-grandaj nacioj, kaj fine por ke la cieaj homoj povu elekti sian vojon kaj obeon. La Demokratio devas esti sendangeregita kaj asekurita en la tuta mondo. Ĝia kvieteco devas esti bazita sur la spertitaj fundamentoj de politika libereco.

Ni havas neniajn profitemajn celojn. Ni deziras nenion militakiron, nenion superestrecon. Ni petas nenion kompenson por ni mem, nenion materian kompenson por la oferoj, kiujn ni volonte faros. Ni estas nur unu el la probatalantoj por la rajtoj de la homaro. Ni estos kontentigitaj kiam tiuj rajtoj estos tiom asekuritaj, kiom eble, per la honesteco kaj la libereco de la nacioj.

* * * Dolorigon kaj korpremegan devon. Sinjoroj Kongresanoj, mi plenumis, parolante tiel al vi. Estas atendebraj multaj monatoj de severa suferado kaj sinofero. Terura afero estas konduki tiun ĉi grandan paceman popolon en militon, en la plej timegigan kaj ruinigan el ĉiuj militoj, pro kiu la civilizacio mem ŝajnas esti riskata.

Sed justeco estas pli altvalora ol paco, kaj ni batalos por la aferoj, kiuj estas ĉiam plej proksimaj je niaj koroj, por demokratio, por ke tiuj, kiuj submetigas al aŭtoritato, havu rajton de voĉo pri propra regado, por la rajtoj kaj liberoj de malgrandaj nacioj, por ke la justeco regu universale per interkonsento de

liberaj popoloj; kiu alportos pacon kaj sendanĝerecon al ĉiuj nacioj kaj faros fine la tutan mondron libera.

Al tia tasko ni povas dediĉi niajn vivojn kaj niajn trezorojn, ĉion, kio ni estas, ĉion, kion ni posedas, kun la fiero de homoj, kiuj scias, ke la tago estas nun veninta, kiam Usono povas priviliigi foruzi sian sangon kaj sian povon por la principoj, kiuj naskis ĝin kaj donis al ĝi la felicōn kaj pacon, kiujn ĝi gardis kiel trezorojn. Dio helpos nin; ni povas fari nenion alian.



UNUECO DE ESTRECO, UNUECO DE LINGVO

Je senerara kompremo de l' plej urĝega bezono de la ligitaj armeoj, S-ro G. Clemenceau, franca milita Ministro, prenante sur sin la ideon de l' unueco de estreco, celis je lia kutima persistemeco la realigon de tiu ideo, kaj nur haltis kiam li sentis ĝin efektiviginta.

Neniam—kiel ni permesis al ni tion respektete skribi al lin— nur ĉiuj francoj sed ankaŭ ĉiuj regatoj de l' ligitaj landoj estos sufice al li dankaj pro tio.

Sed la ligitaj armeoj, kiuj kunkombatis kune flankon ĉe flanko, kaj kiujn ĉe hodiaŭ la nunaj okazoj devigas kunmiksi parolas malsamajn lingvojn kaj ne povas sin reciproke kompreni. De tio povas rezulti ŝanceligoj tre malhelpaj kaj precipite tre danĝeraj.

Al la unueco de estreco, kiun tiuj armeoj havas nun, dank' al S-ro Clemenceau, estas do laŭ ni necesige ke ili povu, kiel eble plej baldaŭ, aldoni la unuecon de lingvo.

Sed kiel havigi ĝin al ili? Estas neeble pripensi por tio peti de ili ke ili lernadu dum la milito la lingvojn unuj de la aliaj. Kaj la lernado de nur unu el iliaj lingvoj ne nur postulegas multajn jarojn kaj cetere ne povus farigi sen profesoroj, sed ankaŭ ĝia kono estus devige ne kompleta pro la malfacileco de la elparolado, kaj ne permesus al la liganoj sin bone reciproke kompreni.

La sola do praktika rimedo por solvi tiun problemon estas la alpreno de sama dua lingvo sufice facile por povi esti lernata rapide, kaj sufice perfekta por permesi al la Liganoj sin ĉiujn kompreni tute kaj sen ŝanceligadoj.

Tia estas precize la karaktero de Esperanto, kiu pro ĝia logikeco, kaj pro la malesto de malfacileco de elparolado, povas esti lernata de ĉiuj, en la daŭro de nur kelkaj semajnoj, kaj kies la anoj, jam multaj en ĉiuj landoj, parolas kaj sin reciproke komprenas tiom facile kiom se ili havus ĉiuj la saman nacian lingvon.

Ni ne povas do tro deziri ke, por eviti la gravan danĝeron, kiun ni montras ĉi-supre, ĉiuj ligitaj armeoj alprenu Esperanton kiel duan komunan lingvon.

Ciu cetere el tiuj armeoj jam kalkulas iun nombron da Esperantistoj. Kial oni ne rajtigus de nun tiujn-ĉi—kiel proponis al ni la ideon, antaŭ kelkaj tagoj, unu el niaj “poilus” (t.e. kuraguloj) S-ro Ch. Cresp foto-aero eskadreto—surporti sur la maledekstra brako, laŭ la maniero de l' militralilistoj, signalistoj k.t.p. apartan insignon (nian karan verdan stelon).

Tiel, kiel skribis al ni S-ro Ch. Cresp, ĉiuj Esperantistoj de l' legitaj armeoj sin ekkonus reciproke sen ia malfacileco. Ili ne estas verdire oficialaj, sed duonoficialaj interpretistoj. Kaj ili ne malpli farus grandan servon.

Ilia nombro cetere tre rapide kreskus. Ĉar, se kiel ĉio permisas opinii, la fervoruloj de Esperanto bonvolus diligente klopodi por tute klarigi la valoran helpon, kiun povas doni la unueco de lingvo al la unueco de estreco, ne estas dube ke ĉiuj oficiroj kaj suboficiroj kaj granda kvanto da soldatoj de la legitaj armeoj ne ŝanceligus pro la malgranda peno kiun postulas la lernado de Esperanto, lernado kiu kiel ni neniam povos tion tro rediri, estas pro ĝia simpleco prefere distrajo, ol lacigo.

Kaj oni vidus baldaŭ, por akceli la venkon, ĉiujn niajn bravajn defendantojn, aldoni je ilia propra volo—ĉar tio almenaŭ dependas nur de ili,—al la unueco tiom oportuna de estreco la unuecon de lingvo tiom dezirindan ankaŭ.

L. Demarcy,
Prezidanto-fondinto de la Esperantista Grupo,
Beauvaise (Oise), Francujo.



ESPERANTO EN LA KOMERCO



Anglujo, per la voĉo de ĝiaj gravaj industriistoj kaj komercistoj, laŭtege insiste petas la alprenon de Esperanto por komuna komerca lingvo de l' Liganoj.

Komitato starigis por tio ĉe Londono, kiu konsistas el gravaj komercaj eminentuloj, kaj titoligis “The Common Commercial Language Committee.”

Tiu komitato organizis unuan paroladon, kiu okazis ĉe Mansion House (la loĝejo de l' Lord Mayor ĉe Londono) la 8an de Marto. La paroladon, kiun prezidis la Lord Mayor mem, faris S-ro A. Barton Kent, unu el la asocioj de l'firma G. B. Kent and Sons, unu el la plej gravaj industriistaj firmoj ĉe Londono. Gi tiom sukcesis ke Lord Soutwark kiu ĉeestis, petis senprokraste ke ĝi estu referata “speciale por la Eduka Komitato de la Londona Komerca Ĉambro kies prezidanto li estas.”

Siavice, “The Common Commercial Language Committee” organizas alian paroladon ĉe Liverpool, kaj intencas daŭrigi interseke sian propagandon en la plej grandaj urboj de Anglujo.

Neeble estas dubi, pro tiuj kaŭzoj, kalkulante la pravecon de l' ideo kaj la persistemecon tre konatan de niaj Liganoj, ke

Esperanto rapide estos uzata flue de la Komerco en la tuta Britujo.

Sed kiel rimarkiĝas mem "The Common Commercial Language" la helpa lingvo povas esti vere utila nur se ĝi estos same konata kaj uzata de ĉiuj komercistoj kaj industriistoj de ĉiuj ligitaj landoj.

Ni deziras do ke komitato, kiel tiu de Anglujo, starigu, kiel eble plej rapide, en ĉiuj ligitaj landoj, kaj siavice ke ĝi organizu serion da paroladoj por la propagando. Kaj ni invitas ĉiujn komercistojn kaj industriistojn de nun eklerni Esperanton tiom simplan kaj tiom facilan ke ĉiu el ili povas ĝin lernadi sola kaj sen instruanto, **en la daŭro de nur kelkaj semajnoj.**

L. Demarcy,
Leĝosciencia Liciencisto,
Beauvaise (Oise), Francujo.

KIAMANIERE NI ADIAŬIS LA FORIRANTAJN SOLDATOJN

—○—
De W. D. Witt
—○—

Puffa-puffa, puffa-puffa, puffa-puffa. "Ha, rapidu, Betty, rapidu! Vagonaro portanta soldatojn tre baldaŭ preterpasos," mi kriis al mia trijara knabino; ĉar mi bone konas la malrapidan regulan puffa-puffa'on de la longaj vagonaroj peze ŝargitaj per multaj soldatoj, kiuj iras al la ensiipejo por iri Franclanden. "Rapidu, ni diru adiaŭ al la 'soldataj knaboj.'"

Laŭ la trotuaro ni kuris, tiel rapide kiel ŝiaj malgrandaj piedoj povis iri, kaj post minuto ni alvenis al la stacidoma ŝtuparo; prenante la knabinon en miaj brakoj mi suprenkuris la altan ŝtuparon kaj alvenis al la perono jus kiam la longa vagonaro komencis preterpasi.

Trarigardante ĉiujn fenestrojn, montrante feliĉajn ridetajn sanajn vizagojn, la soldatoj flirtigis tuketojn, kriis, hurais kaj fajfis. Ni, responde, svingis la brakojn, flirtigis standardojn kaj tuketojn, kaj kriis, "Bondezirojn al vi ĉiuj. Adiaŭ, knaboj, adiaŭ."

El apudaj domfenestroj kaj malsupre sur la strato, viroj, virinoj, knaboj kaj knabinoj, ankaŭ salutis la soldatojn, la aŭtomobilaj kornoj sonis, kaj forte fajfis ĉiuj la fabrikejaj fajfiloj. Bonan adiaŭon ni donis al la forirantaj soldatoj.

Malrapide la longa, portanta niajn bravajn soldatojn vagonaro preterpasis kaj malaperis en la kvietan malproksimecon. Ne plu ni aŭdis la vagonaron, nek la kriojn de la adiaŭantaj soldatoj. Ni restis solaj.

Kun stranga pezo en mia brusto, ni nin deturnis de la stacidomo, kaj mi sentis ke mi preskaŭ ne povas min regi. Nur malfacile mi povis paroli al la knabineto kiu babilis ĉe mia flanko.

"Cu ili devas iri malproksime?" ŝi diris. "Jes, karuleto." "Mal-mal-malproksime," persiste ŝi demandis. "Jes, jes, trans la grandan maron, mal-malproksime," mi respondis per ŝanceligaj vortoj; kaj mi deturnis la vizagon for de ŝi, por ke ŝi ne demandu pri miaj malsekaj okuloj.

"Niaj bravaj, bonaj knaboj," mi murmuris, "mi ne konas eĉ unu el vi, sed nun vi estas al mi kiel miaj propraj fratoj. Miaj plej bonaj deziroj iradas kun vi. Bone prizorgu pri vi mem, subpremegu la malamikon, kaj fine kun ĝojo revenu al ni."

"Cu ili baldaŭ revenos?" demandis Betty, aŭdante miajn lastajn vortojn. "Jes, jes, ili revenos—post longa tempo—eble."

SAVU ! PROTEKTU !

De H. I. Keyes

Flugante supren tra l' aero
Ce sia hejma Okcidento,
Ekvidas aglo, ke sur tero
Aglidon kaptis jam serpento.

Malsupreniras ĉe la vido
La aglo per kvazaŭa falo;
Patrina zorgo pri la ido
Sin tuj altiras al batalo.

Kun terurego la agleto,
Sin eksentante en kaptilo,
La faldojn de la viva reto
Freneze batas per flugilo.

Ho ve, aglido ! via forto
Kun via krieganta lango
Venkiĝos, kaj vampira morto
Satigos sin per via sango.

Jen maltriumfas la perfido !
Alflugas aglo kiel vento
Por savi vivon al la ido
Kaj fari punon al serpento !

The Circulars sent out regarding rates for room and board at the Green Acre Congress stated that rates were at that time uncertain. Information received since that time enables us to say that it will cost approximately \$3.00 per day for both room meals.

DEZIRAS KORESPONDI

One insertion: 10 cents; four insertions: 25 cents. Announcement consists only of name and full address.

Unufoja anono: 20 sd.; kvarfoje: 50 sd.
Anono konsistas nur el nomo kaj plena
adreso.

S-ro G. Krikava, San Juan 782, Buenos Aires,
Argentina. 6
S-ro S. Čarniavskij, Uspenskaja 8, kv. 4,
Pskov, Russia (via Japan). 5

S-ro Angelo Corral, Str. Pavon 1312, Buenos
Aires, Argentina. 4

F-ino E. Catala, straço San Martin 2049,
Talleres, F.C.S., Buenos Aires, Argentina. 4
Kun gesamidenoj.

S-ro Vincente D. Bonetto, Serodina, Argent-
ina. 4

S-ro Maurice Mazonaud, Perigneux, 22 rue
Louis Blanc, France, P.I.K. Ciam respon-
dos. 4

Eleventh Annual Congress

of the Esperanto Association of North America

..... 1918.

Miss E. J. Meriam, Treas.
50 Congress St., Boston, Mass.

Enclosed find \$..... for Tickets for the 11th Congress
of the Esperanto Association of North America, at \$3.00 each.

I expect to attend the Congress. Please reserve room(s) for.....
person(s) with table board.

I do not expect to be present but enclose \$..... as a contribu-
tion toward the expenses of the Congress.

Signed

Address.....

.....

In order to provide for your comfort and pleasure we should
have your application for Congress Ticket and room not later than
July 10.

Remarks:

PROPAGANDA POST CARDS

Synopsis of Esperanto Grammar on back. Space for message on front. An excellent way to write to your friends and at the same time call their attention to Esperanto.

**25 for 15 cents.
100 for 50 cents.**

Try them

THE AMERICAN ESPERANTIST CO.

West Newton, Mass., U.S.A.

Important Announcement

We have just published a new and thoroughly revised edition of

Baker's "Introduction to Esperanto,"

which will fill the need for a textbook more comprehensive than the "Key" which will sell at a low price. This is an exceedingly well written little book and we cannot recommend it too highly.

**10 cents per copy.
\$8.00 per hundred.**

THE AMERICAN ESPERANTIST CO.

West Newton, Mass.

A NEW ONE

Esperanto Stick Pin. Green Star, Gold Back, Letter "E" in gold. Twist in shank of pin to hold it in place.

35 Cents Postpaid

AMERICAN ESPERANTIST CO.
West Newton, Mass., U.S.A.

The Writer's Monthly

Edited by J. BERG ESENWEIN

A magazine of real help for all who write.

Carolyn Wells says:

"The best magazine of its kind because it is *practical*."

Single copies 15 cents - - \$1.50 a year

The Writer's Monthly, Dept. A
Springfield, Mass., U.S.A.